# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

Redakcia adreso: ADOLF WALDMANN, Illerstr. 8, BREMEN, Germanio.

## Eklezianoj k liberpensuloj en Ĉeĥoslovakio.

Tuj post la mondmilito estis inter la ĉeĥoj granda antipatio kontraŭ romkatolikaj pastroj. Parte kaŭzis tion la ĉeĥa antaŭmilita literaturo. Preskaŭ ĉiu romano rakontis pri helpado de l'romkatolika eklezio al la germana imperio k poste al la reganta Habsburga dinastio por subpremado al la ĉeĥa nacio.

Jam reĝo Vaclavo la Sanktulo (Venceslao) estis gvidata de l'kristanaj pastroj, sed ankaŭ mortigata pro ili en la jaro 929. Poste la romkatolika eklezio montriĝis ankoraŭ trifoje la plej granda malamiko de l'ĉeĥoj: Unue, dum la „Husanaj militoj" (1415–25). Due, post la batalo sur la „Blanka Monto" apud Prago en la jaro 1621 k dum la rezultinta kontraŭreformacio. Trie, dum la tuta mondmilito. Depost la jaro 1915 batalis ĉeĥoj – kiel estintaj militkaptitoj – precipe en la rusa, sed ankaŭ en la itala k franca armeoj kontraŭ Germanio k Aŭstrio-Hungario. La pastroj laŭdis la fiajn ekzekutojn kontraŭ la rekaptitaj ĉeĥaj legianoj.

Pro tiuj kaŭzoj ne estis mirinde, ke jam ĉe la unua popolnombrado en Ĉeĥoslovakio (1921) inter 13,8 milionoj da loĝantoj estis 724 528 senreligiuloj. Preskaŭ ĉiuj el ili estis ĉeĥoj.

Sekvis dek jaroj, dum kiuj la situacio ŝanĝiĝis. La ĉeĥoj fondis nacian ĉeĥoslovakan eklezion. La diferenco inter ĝi k la romkatolika estas: Dum la diservo estas uzata ĉeĥoslovaka lingvo; la pastroj rajtas edziĝi; ili ankaŭ ne kredas la plej malsaĝajn dogmojn, kiel neerarpovon de l'papo k virgulinan naskon.

Bedaŭrinde la laboro de l'ĉeĥa burĝa organizo liberpensula estis tute erara. Ĝi proklamis nuran batalon kontraŭ la romkatolika eklezio, sed helpon al la ĉeĥoslovaka k aliaj reformitaj eklezioj. Al tio venas ankoraŭ, ke la ĉeĥa komunista organizo liberpensula estiĝis nura enterig-asocio.

Nun komenciĝis laboregi la germana proleta asocio liberpensula. Ekzemple en la distrikto Teĉen (Tetschen) ĝi laboris tiel bone, ke ĉi tiu distrikto nombras pli ol 30 mil neeklezianojn. Jen dekjara sukceso en la germana regiono; dume en Prago *malpliiĝis* la nombro de l'neeklezianoj je mil personoj, kiuj konvertiĝis al la ĉeĥoslovaka eklezio.

La nuna nombro da neeklezianoj en Ĉeĥoslovakio estas 853 717 inter 14,8 milionoj da loĝantoj. Tio estas la rezulto de l'dua, antaŭjara popolnombrado. Resume oni povas diri: La romkatolikoj perdis anojn. Ili transiris al la ĉeĥoslovaka eklezio k al la germanaj liberpensuloj.

*Francisko Erv. Hammer (16 867), Herrnskretschen, Ĉeĥoslov.*

## Jen kiel la kristana eklezio ricevas monon.

La internacia „Institucio de la Sankta Infaneco" 44, str. Cherche-Midi en Parizo, institucio prizorgata de sinjorega moŝto *Mirio*, ricevis dum la jaroj 1930-31 kiel monoferojn, donacojn, k kotizojn la sumon de 28 milionoj da fr. frankoj.

Eĉ la papo estas profitema, la itala registaro malaperigis la enirpagon por la muzeoj, sed ne la papo rilate al la vatikanaj muzeoj.

Ĉu la papa moŝto estas malriĉa? Krom la monoferoj al la *Sankta Petro* el la tuta mondo, li ricevas de la itala registaro pro la interkonsento de Laterano rentumon de 88 milionoj da liroj. Li eble ne havas fidon al la estonto de l'faŝismo, ĉar li aĉetas kelkajn valutojn italajn, ĉefe la valutojn de elektraj firmoj: Dalmido-Edison k Electro-chimica-caffera, sed plej multe li aĉetas eksterlandajn valutojn, usonajn k anglajn, k obligaciojn de la pola pruntepreno 7⁰/₀-a garantiata de la tabakmonopolo.

La eklezioj havas ankoraŭ grandajn rimedojn por bari la vojon al la normala evoluo de la socio k de la cerboj.

*Laŭ la ĵurnalo „Libera Penso" (Libre Pensée) kompilis 12 642.*

## Peresperanta agado de UMA.

La Unuiĝo de Militantaj Ateistoj en USSR (UMA) eldonas de sia monata ruslingva revuo Militanta Ateismo aparte presitan esp-lingvan resumon. Ĉi tiu resumo pro sia amplekso (16–24 paĝoj, formato 25×18 cm) k pro siaj sufiĉe detalaj artikoloj aspektas kiel tute memstara revuo k meritas la atenton de ĉiu liberpensulo.

La redakcio celas per ĉi tiu esperanta eldonaĵo (de kiu eliris jam 5 kajeroj) konatigi siajn legantojn kun la militanta ateisma movado en USSR k kun la problemoj de kontraŭreligia propagando. Ĝi estas certa, ke la marksismo-leninisma pritrakto de la temoj prezentos grandegan intereson por la eksterlanda leganto k esperas, ke ĉi tiu ĉiel akcelos la disvastigon de la resumita materialo inter la publiko per la liberpensula gazetaro.

Por montri, kia estas la enhavo de ĉi tiu serioza k bonaspekta resumo, sekvu la temoj de kelkaj artikoloj: „La taskoj de la marksisma historio pri religioj" (Lukaĉevski), „Ĉu la homo originas de simio?" (Nikolski), „Scienco pri homkonduto k religio" (Ĉernomordik), „Teknikigo de eklezio en Usono" (Tan-Bogoraz), „La rusa eklezio antaŭ la epoko de kapitalismo k la skismo" (Nikolski), „Leninisma doktrino pri konkreta vero" (Koŝin), „Teatro k religio en Japanio" (Gluskina), ktp, ktp.

Alia esp. eldonaĵo de UMA estas ĵus aperinta broŝuro „Unio de Militantaj Ateistoj en USSR k ĝia laboro". Amplekso 40 paĝoj, formato 22×14 cm. Ĉi tiu verketo donas en serio da artikoloj de diversaj aŭtoroj multflankan superrigardon pri la agado de UMA.

Lukaĉevski skribas pri „Marksismo-leninismo k la batalo kontraŭ religio", Kandivov pri „Religio kiel ilo de klasbatalo, bremsilo de socialisma konstruado", Oleŝĉuk pri la „Historio de Uma k ĝia laboro". La ceteraj artikoloj temas pri „La infanoj de oktobro", „La laboro inter la orientaj nacioj de USSR", „UMA k la Internacio de proletaj liberpensuloj", „La sovetiaj leĝoj pri religio k eklezio", „La UMA en ciferoj" k „Citaĵoj el la statuto de UMA".

La esp. resumo de Militanta Ateismo k ĉi tiu broŝuro estas senpage haveblaj ĉe la Centra Konsilantaro de UMA, Sretenka 10, Moskvo.

Ĉar ĉi tiu peresperanta agado de UMA nepre meritas nian subtenon, ĉiu mendu nomitajn eldonaĵojn k laŭeble utiligu la materialon por nacilingvaj liberpensulaj gazetoj. *670.*

## Liberpensula jubileo.

Fine de decembro 1931 la Nederlanda Liberpensula Unuiĝo „Dageraad" (Matenruĝo) festis dum tri tagoj la 75-jaran jubileon.

Antaŭludo estis la sunturniĝfesto en la mateno de la 25-a de decembro. Tagmeze okazis festkunveno de la membroj. Liberpensula ekspozicio montris la batalon dum la pasintaj 75 jaroj. La lastan tagon okazis granda kunveno.

*A. R.*

## *Liberpensulaj korespondantoj.*

*Gek-doj!*

*Dankon pro via aktiva helpo. Estas ĝojiga fakto, ke la nombro da kunlaborantoj en nia sekcio kreskas. Mi petas, ke vi daŭrigu vian laboron k sendu regule materialon aktualan k interesan.*

*Atentu jenon: Neniam forgesu noti la fonton! Verku vian manuskripton zorgeme k skribu ĝin sur unu flanko de l'folio. Vi ŝparas al mi multe da laboro.*

*Red.*